

MALGRANDA REVUO

Nro 2 · 1948

6a JARO

PREZO: 1:- Kr.

ENHAVO:

	Poĝo
VANA SKRIBO de L. C. Deij	1
FAMAJ KANARIAJ VEGETAĴOJ de J. Régulo Pérez ...	3
LA BERSERKOJ KAJ LA RUĜA MUŜFUNGO de Poul Thorsen	8
PRI LIBROJ de L. C. Deij	13
PHA GVIDAS TRA NUBOJ KAJ NEBULOJ de Gido R. Emfeld	16
DU POPOLFESTOJ EN NEDERLANDA URBO de J. M. Toorneman	19
LINGVAJ SUGESTOJ de S. Engholm	23
KOMENTO	27
LITERATURO	28

Redaktoro — Eldonanto:

STELLAN ENGHOLM, LUDVIKA, SVEDUJO

MALGRANDA REVUO

aperas kvaronjare. Prezo 1 kr. (inkl. sendkoston). Jarabono 4 kr. Unuopa ekz. al eksterlando kontraŭ 3 rpk. — S. Engholm, Skolgatan 9, Ludvika, Svedujo. Poŝta ĝirokonto 26 80 23.

Perantoj

- Aŭstrio: Eldonejo "Tramondo", Neutorgasse 9, Wien I.
Belgujo: Flandra Esperanto-Instituto, P. van Humbeekstr. 3, Brusel W.
Britujo: Libroservo de UEA, Herongate, Rickmansworth (Herts).
Danujo: Libroservo de CDEL, Fr. Jörgensgade 4 A, Kopenhago N.
Finnlando: Eldono Vilho Setälä, Onnentie 23, Helsinki Kĉ.
Francujo: Unuigo Esperantista de Francujo, 34 rue de Chabrol, Paris X.
Italujo: Sro Leo Costantini, Banco di Roma, filiale, Milano.
Nederlando: Libroservo FLE, Roelantstr. 4, Amsterdam W.
Palestino: Sro J. Kohen-Cedek, P. O. B. 7015, Jerusalem.
Polujo: R. Sakowicz, Warszawa (21) — Okecie.
Portugalujo: Sro Saldanha Carreira, Av. Grão Vasco, 33, r/c, Benfca-Lisboa.
Svisujo: Sro O. Walder, Elgenheim, Romanshorn.
Usono: Libroservo de American Esperantist, 114 W. 16 St. New York 11.

MALGRANDA REVUO

Nro 2

6a JARO

1948

Vana Skribo

De L. C. DEIJ

Min surprizis la famo, ke tondros la tero
kaj falos ĝis lasta kolon' la kulturo
de l' homaro. La verkoj de l' verda Espero
— por eterno hieraŭ kreitaj — sen spuro
forflamus jam morgaŭ... Nun io rikanas
interne, ke mia skribado jam vanas.

Kaj ankoraŭ sen klara kompren' mi forŝovas
la librojn kaj tuj mi revidas konsternite
la teruron, pri kiu ne volas — ne povas
mi paroli... tro multe dolorus interne.
Mi devas protesti! mi devas batali!
Mi pekas... mi lasas la manojn jam fali.

Kial estas memoroj! kaj kial parolas
al mi la mortintoj? Mi vidis denove
la soldatojn, la flamojn — Ne! Ne! mi ne volas...
Lasu, lasu min skribi! sed kiam ekprovo
mi metas la plumon elnigras profano:
Sinjor'! jam eksplodu ĉi granda vulkano.

Ve! do falu perfort' kiel lafo detrue
sur verdajn deklivojn de am' kaj bonvolo,
sed frakasu min! Ĉu tiel mi skribis? Malfrue
mi komprenis — post longa sufero en solo:
neniom utilas rezigno fatala;
utilas nur tio: konduto morala!

Kaj kun nova espero mi skribas — sed vane...
La vortoj malplenas kaj kredon ne donas.
La plej bonaj — pri paco — impresas infane,
ĉar la tondroj de l' tria milito jam sonas.
Ĉu tiu ĉi tempo tro krudas por revo?
Pli multe, pli peze postulas la devo!

Ĝis mi skribos pri morgaŭ pli bela, pli festa
la nuno sen celo kaj griza pluŝovos
sin. Mi kreos la celon kun mano honesta
kaj per buŝo sincera animon enblovos;
mi kovros la grizon per varma purpuro,
ĉar nuno, Vi estas patrin' de l' futuro!

La patrino de l' morgaŭ... Si estas doloro
malbela kaj naskos malbelan infanon.
Sed mi instruos ŝin ami sincere kaj kore
kaj al ĉiu morgaŭo mi donos la manon.
Por bon' de l' hieraŭ la nuno min benos,
sed ofte mi timas, ke mi ne eltenos.

Kvazaŭ ombroj la tagoj alvenas, per vento
de l' tempo portitaj, rapide aŭ lante,
sed la nuno rapide. Kaj morgaŭ kun sento
de malpleno mi diros: hieraŭ, havante
la okazon bonfari, mi tamen "forĝesis",
sed morgaŭ! Ne, nun! Kaj mi ĵure promesis,

kaj mi prenis la plumon por flama avizo!
Sed vortoj ne venas, nur granda doloro,
kaj mi sentas: bonfaro ne estas devizo,
ne parolo de l' buŝo, sed kredo de l' koro!
Mi mem estas kulpa! — Se tion mi povos
konfesi, la vortojn por skribi mi trovos.

Famaj Kanariaj Vegetaĵoj

De J. RÉGULO PÉREZ

La Kanariaj Insuloj eniris la historion en la XVa jarcento, kaj poste ili famiĝis en la tuta mondo. La ĉefaj famportantoj estis la insulaj produktoj. Pri tiuj temas jena priskribo.

Insulara klimato neco, indiĝenaj vegetaĵoj kaj facila alklimatiĝo de ekzotikaj plantospecoj kaŭzis, ke la Kanariaj Insuloj, de sia frua historia tempo, donis al la tutmonda komerco plantojn kaj fruktojn kaj produktojn el tiaj. Tiuj vegetaĵoj kreskis en valoj kaj

sur marbordoj, sur bazaltaj krestoj kaj eĝoj kaj en malgrandaj humaj lokoj kuŝantaj dise en nigraj lafokampoj.

El tiuj plantoj estas unua en la tempo speco de likeno (Rocella tinctoria), kiun la insulanoj nomas orchilla (elp. orĉilja). La orĉiljo estas seka, raspsurfaca likeno, kiu kreskas sur altaj montkrutaĵoj, en fendoj de rokoj, sur randoj de ravinoj, ĉiam en lokoj tre sunvarmaj kaj forte frapataj de ventoj. Ĝi kreskas faske, kvazaŭ blanka, griza



De Tenerife: en la valo bananoj, neĝo sur la montpinto Teide (3721 m super la maro).

Tipa pejzaĝo de Tenerife.

aŭ malhele kaŝtankolora hararo. Generale ĝi estas ne pli ol 10 cm longa. La orĉiljo vivas kaj kreskas spontanee sur ĉiuj insuloj sed precipe sur Lanzarote kaj Fuertaventura. Tiun likenon oni uzis preskaŭ ĝis nia tempo por fari riĉajn tinkturojn, speciale purpuron. Al tiu malgranda kreskaĵo kelkaj rilatigas la vojaĝojn de la kartaganoj al la Kanarioj, kaj aliaj diras, ke pro tio oni en pratempo nomis la arĥipelagon Purpuraj Insuloj.

Alia tre fama produkto de la insuloj estis la "sango" de arbo, kiun la insulanoj nomas drago kaj la botanikistoj *Dracaena draco*. Tiu vegetaĵo, unu el la plej famaj de la Kanarioj, ornamas ankoraŭ la insulajn panoramojn persiaj puraj kaj imponaj linioj. La trunko de la arbo estas dika kaj cilindroforma, grizkolora simile al figarbo sed bizare ĉizita de postsignoj de falintaj folioj kaj de la paso de jarcentoj. Pro tio estiĝis ĝia nomo. La hispana vorto drago, nun pli uzata sub la formo dragón, estas egala al la esperanta drako. Ĝuste al drako similas la dika, skvamokovrita arbotrunko. La linioj de la arbo estas tre severaj kaj solenaj, kaj la arbo mem estas perfekta, kvazaŭ giganta pokalo plena de verdo kaj bluo, kun rekta trunko kaj ampleksa tufosimila krono. Ankoraŭ nun ekzistas belegaj, majestaj ekzempleroj grandaĝaj kiel la tempo mem. Laŭ botanikistoj ili estas el la tempo de la helena kaj egipta kulturoj, iliaj jaroj kalkuliĝas je miloj. De tiu arbo oni per tranĉoj sur la trunko eltiris sukon, kiu similis al sango koaguliĝinta. Tiu sango estas senodora kaj sengusta, sed kiam oni bruligas ĝin, ĝi agrable odoras. Ĝi ne solviĝas en akvo sed en alkoholo. Oni tre utiligis ĝin en la malnovtempa farmakopeo.

La sukerkano per la araboj venis de Hindujo al Italujo, de tie al Cipro kaj de Cipro al Sicilio. La portugaloj translokis ĝin de tiu insulo al Madejro, kaj de tie ĝi pasis al la Kanarioj. Fama estis la sukerkana industrio de la arĥipelago. Gran Canaria kaj Tenerife posedis po dekdu sukerkanajn muelejojn, La Palma kaj La Gomera po kvar. Sed tiu industrio ruinigis la arbarojn, ĉar la hejtado de la muelejoj konsumis grandan lignokvanton. Tial la kvar

cititaj insuloj, kiuj havis plej multe da arbaro, fariĝis pli kaj pli kalvaj, kiel okazis samkaŭze sur Cipro. Alia kaŭzo de kalvigado estis la frutempa tre intensa industrio de peĉockstraktado. La peĉon oni ricevis el la rezino de la pompaj insularaj pinoj. — De la Kanarioj la sukerkano disvastiĝis al Ameriko, de kie ĝi duonjarcenton poste ruinigis la kanarian sukerproduktadon. Ankoraŭ hodiaŭ oni kulturas sukerkanon sed ne por fari sukeron sed por ekstrakti mielon kaj melason.

De la sama epoko kiel la sukerkano kaj ĝis la fino de la jarcento la insularaj vinoj portis la nomon de la arĥipelago al la ĉefaj eŭropaj landoj. Francujo, Anglujo kaj Germanujo estis la ĉefaj aĉetantoj kaj konsumantoj. Kurioza estas la fakto, ke la Franca Enciklopedio laŭ ĝia laŭvola apero kontrabande venis al la insuloj en malplenaj vinbaroj reportataj al la insularaj havenoj. Oni sekrete legis la malpermesitajn librojn kaj kaŝis ilin en kavigitaj domomuroj. Unu el tiuj kontrabanditaj Enciklopedioj, hazarde trovita kiam oni faligis domon en la urbo Puerto de la Cruz sur la insulo Tenerife, troviĝas nun en la universitata biblioteko de La Laguna. — Eĉ hodiaŭ la insulara malvasio, ĉefe tiu de La Palma, estas ege ŝatata. Sed la eksporto de vino el la Kanarioj, kiu dum la XIXa jarcento okazis ĉefe al Kubo, nun tute ĉesis.

Ĝis la komenco de la nuna jarcento estis tre intensa la bredado de koĉeniloj, insekto devenanta el Meksiko kaj el kiu oni ekstraktis karminon. Pejzaĝoj kun nopaloj estas la hodiaŭa postsigno de tiu pasinttempa kulturo. Nopalo estas arbo, sur kiu vivis la koĉeniloj. Nopaloj kaj agavo — alia ekzotika kreskaĵo alklimatiĝinta sur la insuloj — kiuj borderas lokojn loĝatajn aŭ iam loĝitajn, donas al la arĥipelagaj pejzaĝoj tre proprecan fizionomion.

La insuloj vivas nun en la epoko de banan- kaj tomatokulturoj. Tiu produktetapo estas la plej riĉa el ĉiuj, tiu, kiu malfermis al la arĥipelago la plej esperajn vojojn en la monda komerco. Ĝis 1936 — kaj nun post la milito oni revenas al la antaŭa stato — ekzistis specialaj ŝipoj ang-

laj, norvegaj, germanaj, hispanaj ktp, destinitaj ekskluzive al transporto de insularaj bananoj kaj tomatoj al eŭropaj merkatoj.

La bananujo devenas el Gvineo kaj venis al la insuloj en la komenco de la XVIIa jarcento. De tiu tempo kaj ĝis kiam oni komencis kulturi ĝin intense, ĝi ornamis ĝardenojn kaj privatajn bicenojn aŭ borderis kamparajn vojetojn. Tiu kreskaĵo estas tre dekoracia kun sia brila violkolora trunko kaj siaj vastaj folioj intense verdaj, kie la suno vive rebrilas. En la regionoj, kie oni kulturas bananojn, la insuloj montras strangan kaj jubilan aspekton, kun grandaj verdaj areoj kaj blankaj vilaĝetoj kaj domoj, kie ruĝaj tegmentoj elstaras el la vasto de verdaĵo. Meze en tiu verdaĵo la akvo, stagnanta en multnombraj kvadrataj aŭ rondaj ujoj el armita betono aŭ kun morteraj muroj, brilegas ĉe la suntuŝo kvazaŭ gigantaj lensoj.

La vivo en la bananplantejoj estas tre intensa. Laboristoj iras kun siaj ŝpatoj de unu bedo al alia kaj elsarkas herbojn; irigaciistoj, uzante tre inteligentan planon, pasigas akvon de kondukiloj al la arboj; virinoj kun grandaj palmĉapeloj iras tien kaj reen purigante grapolojn, kiuj pendas de la arboj. Spertulo ekzamenas la grapolojn kaj markas tiujn, kiuj jam estas tranĉindaj. Kun grapoloj sur la kapoj, kvazaŭ korbportantinoj en sunplenaj pejzaĝoj, virinoj paŝas survoje al la enpakejo. Pro delikateco de la frukto oni pakas tre zorge la grapolojn kaj vatas ilin, por ke ili ne difektiĝu dum la longa vojaĝo. Ŝarĝaŭtoj plenplenaj de bananpakaĵoj aŭ tomatkestoĵ veturas sur longaj ŝoseoj tra pejzaĝoj foje pompe subtropikaj, foje vulkane duondezertaj, ĝis la kajo kaj la ŝipo por la vojaĝo al aliaj latitudoj — jen unu el la plej elstaraj nuntempaj trajtoj de la insuloj.

La bananarbo ja estas vojaĝemulo. Migrante ĝi borderis la varman Afrikon kaj unue ripozis sur la Kanarioj. Sed kiel la sukerkano ankaŭ ĝi deziris akompani la tereltrovantojn kaj vojaĝantojn al Ameriko. De la arĥipelago ĝi ĉirkaŭ 1516 formigris al la Nova Mondo, al la insulo

Santo Domingo, unu el la Grandaj Antiloj, de kie ĝi konkeris la kontinenton.

Ridinde malgranda estas la surfaco hodiaŭ dediĉata sur la insuloj al kulturado de bananoj kaj tomatoj: de bananoj 1,1 %, de tomatoj 0,7 %, sume 1.8 %. Sed la granda profito de tiuj du kulturoj igas dediĉi al ili preskaŭ la tutan irigacieblan teron. La tomatojn oni eksportas grandkvante en periodo, kiam ili ne estas haveblaj en aliaj latitudoj. La bananojn oni eksportas la tutan jaron.

La arĥipelago konis ankaŭ la kulturon de terpomoj antaŭ la Hispana duoninsulo, kaj ĝi restis ĝis hodiaŭ. Oni nuntempe kulturas tre bonkvalitan tabakon, precipe sur La Palma, tre ŝatatan en la merkatoj de la ĉefaj hispanaj urboj.

Ankoraŭ mankas priskribo de la plej eksterordinara el la arboj de la insularo, la mirinda Garoe, kiu vivis sur la insulo El Hierro ĝis 1610, kiam frakasis ĝin fortega uragano. Ĝi famiĝis en la historio, en la botaniko — ĝi ja estis unika! — en la legendoj, en la arĥipelaga literaturo. Sed pri ĝi alian fojon.



Parto de bananplantejo sur Tenerife.

La berserkoj kaj la ruĝa muŝfungo

De POUL THORSEN

En pranordaj rakontoj troviĝas ofte aludoj al stranga, ekstaza konduto ĉe batalantoj, la t. n. berserka furiozo aŭ berserk-iro. (Oni nomis tian homon berserk). Jam Saxo Grammaticus, fama dana historiisto mortinta 1200, en sia verko *Gesta Danorum* (Aĝoj de la danoj) multfoje rakontas pri viroj kaptitaj de berserkismo. Ili kvazaŭ freneziga, ululas, mordas siajn ŝildrandojn, glutas ardajn karbojn, trakuras flaman fajron, ion detruas aŭ mortigas, ĝis ili estas peŝe venkataj kaj ĉenataj.

Ankaŭ en islandaj rakontoj oftas ekzemploj pri tiu fenomeno. En unu okazo oni importas berserkojn el Norvegujo por pace ekspluati iliajn fortegojn en rikolto kaj vojkonstruado. La eksperimento malsukcesis, ĉar la berserkoj avidis knabinon. Tiam ili grandpene estis mortigataj en varmega bankabano. (*Eyrbyggja saga*).

Komparante la kazojn ni trovas, ke la stato de furiozo estas ne daŭra sed tempe limigita. Ĝi trafas tute okaze kaj subite. En *Vatnsdæla saga* oni rimarkas eĉ malestimon al la berserkoj. Homo, kiu suferas pro tio, kortuŝe petas amikon pri helpo, kaj tiu promesas pledi por li ĉe la dioj, "por ke tiu malbono lasu vin".

Ankaŭ inter irlandanoj oni trovas en la vikinga periodo, 800—1000, simptomojn de berserka furiozo. Tiutempe estis intima ligo inter Irlando kaj Danujo. La berserkismo ĉesas ĉ. la jaro 1000, kiam kristanismo venkas en la Nordo. En 1015 grafo Erik de Norvegujo kondamnas ĝin kaj ordonas ekzilon al ĉiuj berserkoj. En 1123 la Althing (parlamento) de Islando faris leĝon, ke berserkoj estu ekzilitaj por tri jaroj, kune kun la viroj, kiuj eventuale ĉeestis furiozatakojn sed ne katenis la virojn.

La sveda scienculo S. Ōdman en disertacio de 1784 kiel unua rilatigas berserkismon al fungoj. Li rifuzas la teorion, ke temas pri luphomoj aŭ diablaĵo, pli verŝajnas ebriigo. Post elimino de ĉiuj konataj ebriigiloj (opio,

hiskiamo, haŝiŝo k. a.) li juĝas plej probabla la ruĝan muŝfungon (*Amanita muscaria*). Apogas lin la etnografaj malkovroj de la rus-germano Steller, kiu tiam ĵus vojaĝis kun la dano Vitus Behring en Kamĉatko kaj tie trovis, ke la indiĝenoj ofte manĝas muŝfungojn. Poste ili ebriiĝas ĝis frenezo, fantazias ktp. Laŭ Ōdman la kutimo manĝi muŝfungojn akompanis la enkondukon de la azia ĉefdio Odin, kaj teorie li konkludas, ke la kutimo malaperis, kiam venkis kristanismo — kaj pli puraj ebriigiloj fariĝis konataj.

Verdire multaj aliaj observoj subtenas tiun teorion. Ekz. Oliver Goldsmith rakontas en sia *Citizen of the World* (1774) pri orgioj ĉe la riĉaj tataroj per dekoktoj de fungoj aĉetitaj de rusaj komercistoj. Dum la diboĉado la malriĉaj tribanoj kolektas sin ekster la kabanoj de la festantoj, kaj kiam la riĉaj gesinjoroj aperas "por lasi sian likvaĵon", la malriĉuloj ruze subŝovas lignan ujon kaj poste ĝuas la delikatan fluaĵon kun plej granda kontento kaj tiel same ebriiĝas kiel siaj superuloj.

La germano Langsdorf raportas en 1809, ke la korjako en Kamĉatko glutas sekigitajn ruĝajn muŝfungojn. Unu ĝis tri sufiĉas por gaja tago. Muskoltremetoj kaj svenomo karakterizas la ebrion, sed aliflanke la ebriigito sin movas facilege. Saltante trans bastonon li faras salton kvazaŭ trans arbon. Li laŭte babilas, dancas, kantas senfine. Ebriulo kapablis levi pezegan sakon kaj porti ĝin 16 km, kvankam li ordinare apenaŭ kapablus movi ĝin.

George Kennan, telegrafingeniero en Siberio 1865, ĉeestis inter korjako geedziĝan feston, kie kelkaj gastoj mortebriiĝis per muŝfungoj. La registaro ja malpermesis vendadon, sed rusaj kaj ĉinaj komercistoj tamen importas la raraĵon. La prezo ofte estas pluraj boacoj aŭ 20 dolaroj por unu fungo.

La rusa esploristo W. Joehelson konstatas (1901), ke ĝuo de la ruĝa muŝfungo ĉe la korjako ofte koincidas kun religiaj ceremonioj. Maljunuloj plej ofte degeneras pro la fungoj, kaj ofte ilia bruteca aspekto perfidas ilian malvirton: konvulsiemaj muskoloj, konsumitaj vangoj, ŝan-

celiĝa iro. La korbaj rakontoj abundas de muŝfungaj aludoj. Dio kreis ilin el sia kraĉaĵo, kiu falis sur la teron, por ke ili servu al homoj kiel fortigilo kaj amuzilo. — La korbaj ne manĝas freŝajn fungojn, ĉefe ĉar tiaj estas tro venenaj. Oni sekigas ilin per suno aŭ fajro. Kelkfoje virinoj devas prepare maĉi ilin antaŭ ol la viroj glutas ilin. — Trinki propran aŭ alihoman urinion por konservi aŭ atingi ebrieton estas tre kutima afero. — Ankaŭ ĉukĉoj ĝuas la fungojn, kaj ofte magiistoj ekstaziĝas per ili.

Jocchelson finas raportante pri korbaj kantistoj, kiun li invitis por kanti antaŭ la fonografo, sed kiu pro ĝeno ne kapablis. "Post regalo per du muŝfungoj li tamen ek-kantis plenvoĉe, multe gestante. Mi devis apogi lin, por ke li ne frakasu la aparaton, kaj finfine mi devis perforte tiri lin for de la mikrofono."

Ne mirinde, ke primitivuloj ofte preferas ebrieton per fungoj ol per brando. Tiu ebrieto laŭdire estas pli plezura kaj la postdoloroj malpli severaj.

En la verko Tra sovaĝa Kamĉatko de la svedo Sten Bergman oni povas konstati (p. 113, 115, 205), ke ankoraŭ en 1921—22 la korbaj kaj lamutoj forte emis manĝi muŝfungojn, ĉiam almozetante unue tiun varon de vojaĝantoj.

Latva esperantisto, dro A. Friedenbergs, nuntempe en Danujo, rakontis, ke rusaj kamparanoj kaj li mem en 1914 ĉe la rivero Oka ĝuis dekokton de muŝfungoj, okaze de la militeksplodo, kiam ĉia vendo de alkoholo estis tuj malpermesata. La nediafana trinkaĵo estis tre spica, ne agrabla kaj ne tre ebriiga sed tiom pli varmiga.

(Similaj informoj aŭ observoj rilate al kiu ajn fungo en kiu ajn lando estos tre bonvenaj ĉe la verkinto de tiu ĉi artikolo. Adr.: Bangertsgade 8, IV, Kopenhago, Danujo).

*

Cent jarojn post la teorio de Ödman elstara norvega botanikisto, Schübeler, forte emfazas la samon (Viridarium Norvegicum, Vol. I, p. 224—226). Li estas frapata de "la kongruanta simileco" inter la simptomoj de berserka

furiozo kaj funga ebrio. Li opinias, ke la reala kaŭzo de la berserkismo restis sekreto inter la berserkoj. Pro tio, ke oni jure malpermesis la fenomenon, ĝi ne povas esti malsano, sed pli verŝajne estas rezulto de narkotaĵo. Alia norvego, dro Grön, iom tro simple reduktas la aferon al atakoj de epilepsio.

Konataj narkotaĵoj en la ruĝa muŝfungo estas tri alkaloidoj: muskarino, atropino kaj kolino plus toksino. Ĝuo sole de la nomitaj substancoj ebriigas sed ne kaŭzas tian frenezan halucinadon kiel fungo.

Dana farmakologo, Knud O. Möller, opinias (1945), ke la halucinojn kaŭzas tute nekonata substanco. La sama aŭtoro indikas, ke en Meksiko ekzistas muŝfungo, nanacatl, kiun manĝas indianoj. Estiĝas ebria stato, kies simptomoj ne tre diferencas de la jam nomitaj. Ankaŭ la svisa profesoro M. Roch opinias, ke la ĉefa venensubstanco ankoraŭ estas nekonata. Li priskribas kazon de venenigo per ruĝa muŝfungo al italaj laboristoj: ili kriaciis, dancis kaj kondutis demone, ĝis ili elĉerpitaj ekdormis. Poste ili tute saniĝis.

La sveda mikologo Mörner citas unikan ekzemplon pri konsumo de ruĝaj muŝfungoj kiel batalstimulilo. En 1814 grupo de svedaj soldatoj militatakis la norvegojn en kvaŝaŭ freneza stato, kun ŝaŭmo ĉe la buŝoj ktp. Oni pruvis, ke ili antaŭ la batalo manĝis ruĝajn muŝfungojn. Jen la lastaj berserkoj de la Nordo!

*

Muŝfungoj povas varii, verŝajne ankaŭ la homa rezisto kontraŭ ilia veneno. Efikoj ĉe kamĉatkanoj do ne estas senpere kompareblaj kun tiuj ĉe nordanoj, ankoraŭ malpli kun nordanoj kaj muŝfungoj antaŭ mil jaroj.

Por la teorio de Ödman kaj Schübeler pledas: surpriza simileco de simptomoj de berserkismo kaj funga ebrio, malpermeso kontraŭ berserkismo, unu moderna ekzemplo de berserkismo (1814).

Kontraŭ la teorio parolas: La rakontoj de la mizera korbaj popolo larĝe parolas pri ĝuo, kulto al muŝfungoj, sed ne troviĝas ĉe unu tia aludo en la multaj, altnivelaj

nordaj kaj islandaj rakontoj, nek iu ajn mencio pri trinko aŭ manĝo antaŭ kazo de berserkismo. Plue, inter dekmiloj da ornamantoj, kiuj estas konservataj de la vikinga tempo, eĉ unu ne montras funĝon (la aŭtoro zorge esploris kolektojn en Kopenhago, Dublin, Edinburgh, Oslo, Bergen). Certe estas nenio transdonita, ĉar troviĝis nenio transdonebla. La ekzemploj de funga ebrio ĉe nuntempaj primitivuloj kaj eĉ ĉe svedoj en 1814 ne estas valida pruvo por la pratempo. Se eventuala instigilo de berserkismo estus estinta sekreto, tamen estus sciiintaj pri ĝi kleruloj, regantoj. Krome berserkoj ja ne formis kaston, korpuson; furiozeco tutsimple *ekestis*; kiu ajn povis eksuferi de ĝi. Kaj se berserkoj trovis oportune kaŝi la kaŭzojn de siaj misteraj, diablaj fortoj — kial la teksto de la malpermeso ne mencias tiun sekretemon? Timo ne plu povis esti la kaŭzo. Cetere la malpermeso povas same bone esti postskribo de jam malaperinta malbono kiel mem foriganto de tiu malbono.

Restas do eblo, ke pli postaj tempoj tute miskomprenis la vorton berserkfuriozo. Eble ĝi estis nur lingva, literatura floro por pli vive priskribi frenezon, furiozon de batalo.

Ankoraŭ pli verŝajne estas, ke la fenomeno malaperis pro evoluanta civilizo. Tiel ja okazas nuntempe al unu el ĝiaj paraleloj, la malaja amok-kuro, mortdangera frenezostato, kiu rajtigas kiun ajn ĉeestanton mortigi la suferanton (komparu la malpermeson kontraŭ berserkismo).

Nia konkludo do estas negativa. La pruvoj povas maksimume nur verŝajnigi la teorion. Sed certe pli valora estas klara negativa rezulto ol neklara, nebula pozitiva.

Ĉu iu leganto povas ĵeti pluan lumon al tiu malluma punkto en la kulturhistorio de la Nordo?

Pri libroj

De L. C. DEIJ

La libroj portas la kulturon. Tio estas banala konstato. En pli fruaj tempoj la kulturoj tradiciis pliparte per buŝa komunikado. La sanktaj libroj de la hindoj ekz. fariĝis veraj libroj, t. e. presitaj paperfoliaroj, nur en nia epoko. Antaŭe la bramanoj transdonis la instruon de siaj kvar "Vedoj" buŝe, sen preso aŭ skribo. Kaj dum multaj jarcentoj ili parkeris ĝin ofte kun mirinda facilto kaj ekzakto.

Ĉu la moderna homo ne estas tiel memorforta? Por ĉio li havas ian kompendion, terminaron aŭ ŝlosilon kaj lia plej grava libro verŝajne estas la... notlibreto! Tion mi diras ne por moki. Kiel la teleskopo plipotencigis la homan okulon, tiel same la libroj milmiloble plifortigis la memoron. Kaj al tio, ke la libroj servas kiel fidindaj memoriloj, ni ŝuldas la grandajn konkerojn de la homa genio.

La presarto ebligis grandiozan disvolviĝon de la homara kulturo. Sed la homo mem, t. e. la unika individuo, plene posedas nur tion, kion li konas ne libre, sed libere, sen bezono konstante rigardi sur paĝo tiom aŭ tiom. Mi riskos diri miajn pensojn iom pli krude. Laŭ la mezuro, kiom ni "elfoliumas" niajn pensojn, povas malgrandiĝi la propra kreokapablo kaj — pli grave! — la propra respondosento. Ne miskomprenu! Fama aŭtoro iam diris: "Por verki du paĝojn mi tralegas dudek librojn." Mi trovis lin saĝa viro.

Tamen la plej gravaj manifestiĝoj de nia propra spirito — ĉu poemo, ĉu formulo — devus esti parkeraj. Niajn argumentojn ni serĉu ne kvazaŭ telefonan numeron aŭ prezindikon en iu listo aŭ katalogo; la propran vivotaskon ni ne esperu trovi "nete formulita" en iu ajn broŝurita aŭ bindita paĝaro. La pensoj de la moderna, leganta homo estas ofte tro libraj, tro kabinetaj. Ni ne rilatas kontentige al la vivo mem. Niaj paroloj estas ofte nur kliŝoj. En tiu ĉi tempo, en tiu ĉi libro-epoko ni tiel dronas en literaturo, ke ni apenaŭ povas imagi spiritan vivon sen libroj, sen legoscio. La aserton, ke tio tamen estas ebla, multaj trovos diskutinda. Nekontestebla estas la fakto, ke

eĉ al instruitaj homaj la legado povas neniom utili, se ili ne vivas propran spiritan vivon.

Tio estas unu el la malbonaj flankoj de literaturo. Oni ne postulu de libroamanto, ke li emfazu ankaŭ la aliajn. Prefere mi akcentu, ke en preskaŭ ĉiuj rilatoj la libroj estas granda gajno kaj por la homo kaj por la homaro. Ili subtenas la procedon, kiu tiel tre malrapide evoluas interne dum nia tuta vivo: la homiĝo. La libroj povas kulturi ankaŭ la personecon, t. e. liberigi nin el la anonima publika, el la maloriginala, ĉiesa kondutmaniero. Fari la penskapablan animalon homo, la anoniman individuon persono — jen la humana tasko de literaturo. Kaj tie kuŝas ankaŭ la tuta respondeco de aŭtoroj kaj recenzistoj, sed ne malpli de la legantoj mem.

Entute la rolo de leganto ne estas tiom pasiva, kiom oni kutime supozas. En la libroj li retrovas proprajn pensojn, kiujn li mem vane provis vesti per konvenaj vortoj, aŭ konsternate li trovas ĝuste tiajn pensojn, kiajn li ne povas kaj ne volas akcepti. La aprobo naskas kontenton kaj feliĉon. La malaprobo estas ofte pli motora, pli forte instigas al pensa aktiveco kaj progreso. Ambaŭkaze la legado povas esti profita al la interna vivo. Mi skribis: povas esti, ĉar la profito ne venas per si mem. Facilajn romanojn ni legas por distro kaj amuzo. En aliaj ni ripozas. Pli ofte tamen literaturo postulas, ke la leganto devas aktive partopreni tion, kion li legas. Literaturo postulas plenan atenton, spiritan viglon kaj personan reagon. Ĝi devigas la leganton memstare konkludi: bona aŭ malbona, por aŭ kontraŭ. Erara, sed propra kaj sincera prijuĝo estas pli valora ol papagado post iu recenzisto.

La postulo pri memstara valorprijuĝo ne ekskludas certajn komunvalorajn normojn. Rilate al la formala flanko de kompono kaj lingvouzo ekzistas certaj reguloj. Rilate al la esenca enhavo de la libroj la afero ne estas tiom simpla. En pasintaj tempoj oni taksis ĝin laŭ konstantaj, universalaj normoj, devenintaj el la klasika (antikva, greklatina) civilizo kaj la kristanismo. Poste venis literaturskolaj, konfesiaj kaj eĉ politikaj normoj, kiuj pli-

parte jam dissolviĝis. Hodiaŭ universala normo pri literaturo kaj spirita vivo mankas. Eble ankaŭ pro tio la esperantistoj rigardas librojn ĉefe el formale lingva vidpunkto.

La bonega propono de Engholm, ke recenzisto okupu sin pri la esence literatura flanko, gramatikisto pri la esence lingva, neprigas akcepton de komunvalora normo pri moralo, interna belo kaj universaleco. Tiam normon ni tamen ne povas krei arbitre. Ĝi devus iom post iom evolui, tradicii el nia komuna, spirita agado. Tradukantoj kaj verkistoj povus al tio grave kontribui per zorga elekto de adekvataj temoj. Ĉe tio mi absolute ne pensas pri instanca devigo. Gardu nin kontraŭ indekso! Cenzuro estas sensenca perforto. Iam la faŝistoj volis sufoki nian kulturon per librobruligo. Nun oni metas la germanan popolon sub kuratorecon. Malsaĝaj aferoj. Mi imagas, ke la sugestita, universala kaj humana normo iam faros tiajn perfortojn superfluaĵ.

Kun la normo ofte perdiĝis ankaŭ la verkistaj digno kaj respondosento. Ĉu inde paroli pri maldecaj libroj? Ekzistas tutaj bibliotekoj, kie eĉ la ratoj mirus pri tiom da pensorubo kaj malpuro. Sed ankaŭ la kvalito de la bonaj libroj ŝajnas malpliigi nuntempe. Literaturo — feliĉe! — ne plu estas monopolo de bonhava elito. La socia evoluo nivelis ĝin (almenaŭ en multaj landoj). Pro tio la homoj progresis, la libroj malprogresis. Niveligo necviteble forigas altaĵojn. Kial fermi la okulojn antaŭ tiu fakto? Kulturvulgarigo estas necesa. Esperanto mem, la latino de la laboristaro, estas bela ekzemplo pri tio. Same aprobindaj estas la popularsciencaj verkoj, kiuj jam kondukis milojn kaj milojn da homoj en la belegan mondon de artoj kaj sciencoj.

Kaj jen falas en mian kapon nova grumblonuanca ekpenso. Ankaŭ tiaj verkoj postulas de la leganto atentan tralegon kaj personan reagon. Nenio ŝajnas pli konvinkoforta ol simpla, rakontostila verkaĵo pri scienca temo. La objektivaj kaj nerefuteblaj faktoj facile forgesigas, ke certaj sugestoj kaj konkludoj tamen estas diskutindaj. Kiom da homoj estas imunaj kontraŭ la magio, la sorĉo de

la presita formulo? Vidu, tamen mi tuŝis alian malbonon de literaturo! Verŝajne mi estas en malbona humoro. La legantojn konsolu la penso, ke malgraŭ ĉio la libroj restos plej belaj monumentoj en la historio de la homara evoluo. Tempospitaj, eternaj monumentoj. Ĉu post 2800 jaroj ni ne legas ankoraŭ la verkojn de Homeros? Ke ni iam havu tian monumenton en originala esperanto! Ĝi estus nemezureble pli valora ol ĉiuj flugfolioj en la mondo kune.

PHA gvidas tra nuboj kaj nebuloj

De GIDO R. EMFELD

Modernaj metodoj por gvidi aeroplanojn dum malbona vido estas unu el la plej interesaj ĉapitroj de la aviado same kiel de la radiotekniko. Radar, direktitaj ondoj, Loran- kaj Deccasistemoj helpas la aviadiston. Se nuboj aŭ nebuloj malhelpas vidon, li konfidas sin al radiosignaloj, kiuj sencrare informas pri la direkto. Se vi legas pri uzataj metodoj, vi eble konkludas, ke la aeroplanon direktas pli la surteraj teknikistoj ol la kondukisto en la aeroplano. Jam oni eksperimentis per grunda direktado de aeroplano sen kondukisto.

Radiogvido estas grava ankaŭ ĉe alteriĝo tra nebulo aŭ malaltaj nuboj. Imagu la katastrofon, se aeroplano kolizius kun turo, alta domo aŭ alia aviadilo! Tio povas ja okazi, se estas densa nebulo ĉirkaŭ la aviaĵo, kien iras la aeroplano. Ekzistas nur jena alternativo: aŭ ne averturi en nebulo aŭ uzi radiogvidon.

La konstrukosto de moderna aeroplano egalas tiun de mil domoj. Vi facile komprenas, ke tia veturilo donas profiton, nur se ĝi estas daŭre uzata. Ĉiu horo sen flugo signifas perdon. Tial oni serĉis metodojn por ebligi flugon ankaŭ je malbona vido.

La nederlanda aerodromo Schiphol (elp. Sĥiphol) ĉe Amsterdam estis jam antaŭ la milito konata pro tre taŭga radiogvida sistemo. Tie oficas persono, kiu estras la tutan nederlandan aertrafikan teritorion, kaj la voĉo, per kiu li parolas al aviadistoj en la aero, estas la radiostacio PHA, la ĉefstacio de la civila aviado en Nederlando. Ĉiu aeroplano, kiu enflugas la teritorion, devas per sia radiosendilo anonci sin al PHA kaj sciigi siajn nomliterojn, veturdirekton, rapidon, flugalton ktp. Ankaŭ se ĝi forlasas la teritorion, ĝi devas komuniki tion.

Krome PHA havas komunikajn ligojn per radio kaj teleskribiloj kun aliaj aviaĵoj (Prestwick, Praha, Parizo, Stokholmo, Romo, Kairo ktp). Kunlabore kun la meteorologia servo ĝi elsendas veterkomunikojn.

Se la vetero estas normala, validas la t. n. V. F. R. (Visual Flight Rules, t. e. Reguloj por laŭvida flugo). Sed tuj, kiam la vido ne plu atingas 5 km aŭ kiam la nubalto estas malpli ol 300 m, oni devas sekvi I. F. R. (Instrument Flight Rules, t. e. Reguloj por laŭinstrumenta flugo). Tio ofte okazas en la nederlanda aviada teritorio, ĉar en Nederlando la vetero ofte estas malfavora al aertrafiko. Tiam ekfunkcias radiogvido per direktitaj ondoj.

Ni image akompanu aviadiston, kiu direktas aeroplanon al Amsterdam. Li jam estas proksima al la aerodromo Schiphol sed jen rimarkas, ke en Nederlando estas tre nebula vetero. El la aeroplano ne estas eble vidi la aviaĵojn. Feliĉe li disponas radioaparaton, kaj apud la aviaĵo kelkaj radiosendiloj estas jam pretaj gvidi lin teren.


Unue la radiostacio PHA donas al li vicnumeron, ekzemple 2. Tio signifas, ke oni jam okupis sin pri la terenvidado de alia aeroplano tra la nebulo, kaj nia aviadisto devas iom atendi, iom rondflugi en la ĉirkaŭaĵo. Tiu rondflugado devas okazi laŭ definitiva elipsa linio. Se tuj poste venus alia aeroplano, ĝi ricevus numeron 3, kaj plia ricevus 4 ktp. Por eviti koliziojn de la atendantaj, rondflugantaj aeroplanoj, ĉiu numero havas sian altnivelon, nro 1 1000 futojn, nro 2 2000 futojn ktp. Ĉiu aeroplano restas fluganta en sia nivelo, ĝis oni per la radio ordonas

al ĝi malleviĝi unu "etaĝon". La vicigo de la venantaj aeroplanoj estas tasko de speciala nova radiosignilo OA, nordoriente de Amsterdam, preskaŭ 15 km de la aviadejo, kiu kuŝas sudokcidente de la urbo.

La aviadisto ĵus ricevis la numeron 1. Probable oni estas preta pri la antaŭulo. Nun estas nia vico, kaj nia postculo ricevas en la sama momento numeron 2. Nia aeroplano flugas pli malalten ĝis 1000 futoj, kaj la aviadisto klopodas trovi la signolinion. Tiu linio estas radiosignalo, daŭra fajfsono, kiun helpsendilo de PHA aŭdigas laŭ linio en difinita direkto, proksimume nordorienta (precize 48 gradoj sur la kompas). La aviadisto aŭdas la signalon en sia kaptelefono.

Li nun tiel direktas la aeroplanon, ke li aŭdos la seninterrompan signalon. Li jam aŭdas signalon, kiu konsistas el longaj fajfsonoj (— — — —). La fakuloj nomas ilin strioj. Tiu signalo signifas, ke li estas dekstre de la linio. Li do direktu iom maldekstren. Jen la kontinua signalo. Nun rekte al Schiphol. Sub ni kuŝas Amsterdam. Tion ni povas almenaŭ supozi, ĉar ni pro nebulo ne povas vidi la urbon.

Subite rapida serio da rapidaj fajfetoj, punktoj, en la kaptelefono (.....). Li perdis la linion. Tuj iom dek-



stren. Bone, denove la daŭra tono. Oni tiel aranĝis la sistemon, ke la aviadisto dekstre de la linio aŭdas striojn kaj maldekstre punktojn. Li ĉiam direktu la aeroplanon tiel, ke li aŭdas nek punktojn nek striojn sed la daŭran signalon. Tiam li veturas en ĝusta direkto.

Nun li aŭdas dum la daŭra signalo alian kun alia tono; ĝi konsistas el kelkaj strioj (— — —). Per tio li ekscias, ke ni pasas la antaŭsignilon OM, 5000 metrojn antaŭ la limo de la aviadejo. Nun li devas malleviĝi ĝis 150-metra alto. Post kelkaj momentoj denove signalo: kelkaj rapidaj fajfetoj (...). Tio estas la limsignalo IM. Ek al la tero. Kiam ni proksimiĝas je kelkdekoj da metroj, ni ekvidas la teron. Jen la surteriĝa strio kaj la aviadejaj lampoj. La aviadisto ne plu bezonas la radion. Li surterigas la aeroplanon kaj veturigas ĝin al la aviadeja domegaro. PHA signalas novan vicordon tra la aero, kaj ni grimpas kontentaj el nia aeroplano.

Tiel oni en Schiphol helpas la aviadistojn en nebula vetero. La skizita maniero donas la ĉeftrajtojn de la perinstrumenta alteriĝa procedo. Nuntempe la PHA-stabo disponas plurajn radiosendilojn krom la jam menciitaj. Kelkajn kilometrojn nordoriente de Schiphol staras sendilo, kiu povas radiotelefone informi la alflugantan aviadiston pri lia distanco de la aerodromo dum la tuta altera flugo. La aviadistoj estas tre kontentaj pri tiu helpilo. Plue ekzistas la t. n. glitvoja signilo, kiu konigas la oblikvon, kiun la aeroplano devas sekvi flugante al la tero.

Du popolfestoj en Nederlanda urbo

De J. M. TOORNEMAN

En mia loĝurbo, Deventer, kaj ĝiaj ĉirkaŭaĵoj vivas ankoraŭ multaj popolaj kutimoj, kvankam malpli ol antaŭe. Bedaŭrinde kelkaj malaperis, precipe en la jaroj de ambaŭ

mondmilitoj pro nekutimaj vivcirkonstancoj. Feliĉe la plej gravaj restas, kaj la du ĉefajn el ili mi priskribos. Ili rilatas al la festoj de Palmodimanĉo kaj de Pentekosto.

Sabate antaŭ Palmfesto la gepatroj aĉetas ĉe bakisto por siaj junaj infanoj kringon (t. e. radforma pankrono, bakita el plektita pasto) kaj bulkojn en formo de krakenoj, kokoj kaj cignoj. Tiuj panbirdoj havas korintajn sekvinberojn kiel okulojn. Ankaŭ sekvinberojn kaj oranĝojn oni havigis por la festaj aĵoj, ĉar tiujn oni devas propramane pretigi.

Kiam la junaj vekiĝas la sekvantan matenon, ili ekvidas la belajojn sur soĝo apud la lito. La ornamado de la kringo estas la unua festaĵo. En la panradon oni pikas branĉetojn de buksarbustoj (kiuj kreskas laŭlonge de la bedoj en la florkortoj), kaj inter tiujn t. n. palmobranĉojn oni enigis bastonetojn kun koloraj paperflagetoj kaj la menciitajn pankokojn aŭ pancignojn. Sub la pankrono oni pendigas girlandojn el sekvinberoj. La faritan aĵon oni metas sur la supron de bastono, kie oni fiksas belan, grandan oranĝon. La bastono, ĉirkaŭ duonmetron longa, estas ĉirkaŭvolvita per diverskoloraj paperoj, kaj ĝi servas kiel portilo.

La infanoj nun iras por viziti najbarojn, konatojn kaj parencojn, kaj dume ili kantas jenan versaĵon:

Palmo — palmo — pasko, palmo — palmo — pasko,
ejkurej, ejkurej. (t. e. Kyrie Eleison).

Ankoraŭ unu dimanĉon, tiam ni ricevos ovon.

Unu ovo estas neniŭ, du ovoj estas duonovo,
sed tri ovoj estas paska ovo. (Celas al la Triunuo).

Kantinte la infanoj estas regalataj per bongustaĵoj aŭ moneroj. La monon ili elspezos por piroteknikaĵo, kiun ili eksplodigos en la paskotagoj. Kiam ili venas hejmen, ili metas la festobjekton en la aperturon de piedvarmigilo por konservi ĝin por nova rondiro.

La palmpaska bastoneto, ĝiaj ornamentoj kaj la kanto, ĉio prezentas simbolojn. La unuenomita figurita malgrandan majarbon, kaj la ornamo de girlandoj akordas kun la ver-

daj festonoj de tiu arbo. La plantado de majarbo (kaj sekve ankaŭ la procesio kun palmpaska bastono) estas tradicia kutimo idolana, kiu rilatas al la vegetadspirito. Tiu havis simbolon de fruktigo (kokon, fruktojn), kiu estis ankaŭ printempa alegorio (verdaĵo, birdoj).

La signifon de la radforma pankrono oni klarigas diverse. Iuj interpretas ĝin kiel simbolon de la suno, kiu alportas varmon kaj vivon, aliaj diras, ke ĝi devenas de la antikvaj oferkukoj, kiujn oni cindrigis kune kun la mortintoj.

La koko estas signo ankaŭ de tagiĝo, gardemo, reviviĝo kaj saĝeco. La cigno signifas portanton de vivo kaj lumo, ĉar ĝi estas la unua birdo de printempo kaj la lasta, kiu migras suden. Estas do kvazaŭ ĝi akompanus la sunon. La palmbranĉoj celas al la branĉoj, kun kiuj la juda popolo renkontis Jesuon en la dimanĉo antaŭ lia krucumado. Ili estas benataj de pastro en katolika preĝejo kaj estas simbolo de venko.

Alia antikva kutimo en Deventer estas la rondodanco ĉirkaŭ la pentekosta krono en popolkvartaloj de la malnova urbo. Kelkajn tagojn antaŭe komitato faras rondiron ĉe la koncernaj loĝantoj por kolekti monon, kiu servos por aĉeti ornamaĵon por la festkrono. Tiu konsistas el granda kvanto da kolorita sorba papero kaj diverskoloraj lampionoj. El la papero la virinoj faras longajn tondaĵojn en formo de ĉenoj kaj girlandoj. Dume viroj prenas stangon 6—10 m longan kaj alnajlas krucforme sur ĝia supro du ringojn el salikbranĉoj. En distanco de 60—80 cm oni fiksas 6—8 pliajn ringojn, ĉiam kun pli granda dimensio. La stango kaj la ringoj estas ĉirkaŭvolvitaĵoj per kolora papero.

La stangon oni starigas en kuvon, inter pezajn ŝtonojn, kaj kovras la ringojn per la koloraj eltondaĵoj. En la mezo de la krucigitaj ringoj devas pendi ronda lampiono, kaj sub la ringoj pendas cilindraj lampionoj.

En la antaŭtagmezo de la unua pentekosta tago la infanoj de la kvartalo kolektiĝas por fari rondodancon ĉirkaŭ la

belega festkrono. Formante vastan ĉenon ili kantas tedlonge laŭ la tonoj, kiujn muzikisto eligas el sia harmoniko:

La pentekosta krono denove estas enlande, hura!
La flagoj flirtas de ĉiuflanke, hura!
Ni rondodancas laŭ malnova maniero.
Ree ĉiuj kune, manon en mano,
hura, hura, hura! (Refoje).

De tempo al tempo ĉesas la kantado kaj dancado (efektive malrapida irado), kaj kun ĝojkriado la infanoj estas regalataj de la komitato per diversaj frandaĵoj.

Vespere, kiam kandeloj brulas en la lampionoj, ankaŭ plenkreskuloj miksas sin en la junularan rondon, kaj tiam sonas ankaŭ konataj popolkantoj tra la kvartaloj, ofte ĝis noktomezo.

Por la nokto oni formetas la kronon en apudan tenejon aŭ magazanon, sed la sekvantan tagon oni denove starigas ĝin en la mezon de la placo, kaj rekomenciĝas la unutonaj muziko kaj kantado, kun la sama bona humoro kiel dum la antaŭa tago. Sed en la dua pentekosta tago estas la finiĝo de la festaĵoj.

En la malfrua vespero de tiu tago oni portas la kronon al la rivero Ysel, kaj granda amaso da homoj vice sekvas ĝin. Sub gaja bruego de la festantoj oni ĵetas la brilan objekton en la fluantan akvon.

Se la rivero estas tro malproksima de la festejo, oni ekbruligas la kronon, kie ĝi staras, kaj flamoj konsumas lignon kaj paperon dum la ĝojkriado de la ĉeestantoj.

Sendube la pentekosta krono prezentas la saman simbolon kiel la ĉiekonata maja arbo kaj rilatas al la alveno de la belesperiga kaj multpromesa printempo.

Lingvaj sugestoj

De S. ENGHOLM

Komoj.

Kelkaj recenzistoj diris, ke estas tro malmulte da komoj en miaj libroj. Laŭ mia koncepto ili sufiĉas. Povas esti, ke pro pretervido aŭ preseraro iuj mankas, sed tiuj ne estas multaj.

Mi metas komon inter kompletajn propoziciojn. (kompleta propozicio = havanta subjekton kaj predikaton). Ekz.: La viro iris malrapide, ĉar li estis laca.

Kiam propozicio estas enŝovita en alian propozicion, estas komo antaŭ kaj post la enŝovita propozicio. Ekz.: La domo, kiun vi vidas tie, apartenas al mia amiko.

Kiam du propozicioj havas komunan frazparton (ordinare subjekton aŭ predikaton), mi ne metas komon inter ilin. Ekz.: Li komencis leteron sed ne havis tempon por fini ĝin. La suno lumas dum la tago kaj la luno dum la nokto. — En tiaj konstruoj unu el la propozicioj havas sencan nur per vorto en la alia. La dependo estas tiom forta, ke divido per komo ŝajnas al mi ĝena, nelogika.

Laŭ tiuj reguloj mi ne apartigas partecan adverbcon per komo. Ekz.: Rigardinte ili foriris. Rigardinte la ekspozicion ili iris hejmen.

Tiuj reguloj sufiĉas por la tuta regula komsignado inter propozicioj.

Same kiel ni tute konvene kaj logike apartigas enfrazajn "jes" kaj "ne" per komo, metas komon, kie mankas kunliga "kaj" ktp, mi foje, tamen tre malofte, metas komon en aliajn lokojn, kiam pli preciza redono de aparta pensonanco tion postulas. Rimarku la nuancan diferencon inter jenaj frazoj: Tiu sumo estis en tiu tempo multe da mono. Tiu sumo estis, en tiu tempo, multe da mono.

Tiu sistemo verdire estas sveda. Ne pro tio mi uzas ĝin, sed ĉar mi trovas ĝin racia kaj konvena por nia lingvo. Mi altrudas ĝin al neniuj. Tamen verŝajne ne estas superflue menciigi pri ĝi. Mi unuecigas la komsignadon en MR

laŭ tiu sistemo, kaj legantoj kun aliaj sistemoj eventuale demandas sin, kial la komsignado en MR ne estas korekta.

La esperantistoj apartenas al diversaj nacioj, kaj ilia komsignado estas diversa. Anoj de la angla lingvo ofte metas komojn pli malpli laŭ la anglalingvaj kutimoj. En iliaj skribaĵoj ni, anoj de aliaj lingvoj, ofte renkontas komojn, kie ili laŭ nia koncepto ne devus esti, kaj ofte ili mankas, kie ili nepre devus esti. Anglo povas skribi: Komprenoble, estas bona afero, firme teni sin al iu decido. Mi skribus: Komprenoble estas bona afero firme teni sin al iu decido. Anoj de aliaj lingvoj ofte apartigas per komo nekompletajn propoziciojn kaj certajn frazpartojn. Laŭ mia koncepto tio ne plifaciligas al ni percepti la frazojn sed male povas eĉ iom malfaciligi tion.

En kelkaj lingvoj, ekz. la sveda, troviĝas tendenco imiti la anglan kaj francan de la nuna tempo. Oni malofte metas komon kaj metas ĝin nur tie, kie ĝi respondas al pauzeto. Plej ofte la komsignado tiel fariĝas senplana kaj arbitra.

Persone mi estas konvinkita, ke racia, laŭpropozicia komsignado estas grava detalo kaj por legantoj kaj por verkantoj. Por legantoj ĝi ordigas kaj pli precizigas la tekston. Malnovaj anglaj kaj francaj libroj kun zorga kaj regula komsignado estas el legovidpunkto pli agrablaj ol modernaj (kvankam mi ja komprenas, ke tiu impresio povas iom dependi de mia propra gusto kaj propraj konceptoj pri la afero). Ĝi estas bonega rimedo por krei ordon inter vortoj kaj propozicioj. Homo kun bona komsignado apenaŭ kreas nekorektajn frazojn. Korekta regula komsignado — laŭ unu sistemo aŭ alia — postulas zorgan atenton pri la frazoj, sed eĉ pozitive ĝi helpas. Metante komojn oni ofte vidas nebonajn konstrudetalojn, kiujn oni alie ne rimarkus.

La artikolo.

Ne malofte ni uzas pli da artikoloj ol necese. En multaj okazoj influas certe la gepatra lingvo aŭ la pensmaniero

en la gepatra lingvo. Mi parolas ne pri rekte eraraj artikoloj sed pri superfluaĵoj, eviteblaj, foje iom nelogikaj.

Ekz.: La laboro por la paco estas necesa. — Pli simple kaj pli efike skribi tiel: Laboro por paco estas necesa.

La libroj estas grava parto de la kulturo. — Libroj estas grava parto de kulturo. (Se temas pri difinita kulturo la lasta artikolo devas resti.)

Ne mankas la eraroj, precipe pri la indiko de la lokaj perantoj. — Unua artikolo erara, la aliaj superfluaĵoj: Ne mankas eraroj, precipe pri indiko de lokaj perantoj.

Tro multaj artikoloj — kiel ĉiuj superfluaĵoj — malgrandigas la esprimforton de propozicioj kaj frazoj, malfortigas la impreson. Tiaj superfluaĵoj akompanas plej ofte abstraktajn substantivojn, foje tamen ankaŭ konkretajn. Estas bona lingva plibonigo zorge elsarki ilin el siaj skribaĵoj, se eble ankaŭ el la parolata lingvo.

*

En pasintaj jarcentoj skribantaj homoj ofte uzis grandajn literojn tute arbitre, kaj ankoraŭ oni povas trovi tion ĉe homoj, kiuj tro malmulte lernis. Tia skribmaniero ŝajnas al ni kurioza kaj ridinda pro tio, ke ne ekzistas motivo por tiuj grandaj literoj kaj ili estas uzataj tute sen reguloj.

Tute same impresas, ĝenerale, apostrofita artikolo en esperanta prozo. Se oni apostrofus, nur kiam sekvas vokalkomenca vorto, ekz. de l' arbaro, la kutimo havus almenaŭ certan sencon. Sed la apostrofo aperas kie ajn: de l' tero, de l' suno, de l' praktiko, de l' skribado. La apostrofanto eble diras, ke li sekvas sian ritmosenton. Sed neniam mi trovis, ke tiu uzo plibonigis la prozan ritmon. Ŝajne iuj esperantistoj apostrofas unu aŭ du artikolojn sur ĉiu paĝo nur pro tio, ke ili kredas, ke lerta esperantisto devas tiel fari, same kiel niaj prapatroj opiniis, ke oni tiam kaj tiam devas skribi majuskulon.

Mi neniam apostrofas artikolon en prozo. Ŝajnas al mi, ke la ritmo de esperanto estas tia, ke ni senĝene

povas skribi kaj diri "la" ankaŭ antaŭ vokalkomenca vorto. Cetere ni plej ofte vole nevole devas skribi kaj diri "la arbo" k. s. pro la simpla kaŭzo, ke antaŭ la artikolo troviĝas ne vokalfina prepozicio sed alia vorto.

Tiu kaj tiu ĉi.

En skribaĵoj, en gazetoj kaj libroj ni ofte renkontas la esprimon "tiu ĉi", kie laŭ mia kompreno "tiu" estus logika. Kredeble influas naciaj lingvoj.

Per "tiu ĉi" ni parole aŭ skribe montras al io, kio estas loke aŭ alimaniere proksimrilata al ni.

Skribanto mencias libron kaj daŭrigas: "En tiu ĉi libro la aŭtoro klarigas..." Laŭ mia kompreno la libro ne estas proksimrilata al la skribanto mem. Tial estus korekte skribi: "En tiu libro..." Germano en sia lingvo dirus "dieses Buch", anglo "this book". Tamen la rilato inter "tiu" kaj "tiu ĉi" ne en ĉio estas la sama kiel inter "dieser" kaj "jener", inter "this" kaj "that".

Laŭ la supra skribmaniero: "Li poste veturis al Francujo. En tiu ĉi lando li restis..." Laŭ mi devas esti: "En tiu lando..."

La du suprajn ekzemplojn mi ne prenis el teksto sed mem faris. Tial ili eble estas tro simplaj. Sed atentu pri tekstoj, kiujn vi legas! Tre ofte vi trovos ekzemplojn pri tia uzo. Foje "ĉi" estas pravigebla sed superflua, same kiel superflua artikolo.

*

La objektoj de la supraj rimarkigoj estas pli malpli hazarde elektitaj. Se miaj sugestoj havas intereson por la legantoj de MR, mi iom post iom daŭrigos pri pli esencaj lingvokonstruaj aferoj.

Komento

Sro Georges Avril, Francujo, skribas al mi pri "Recenzista dilemo" en MR 1/48 i. a.: "...Sed mi opinias, se temas pri verko, ke ankaŭ la *formo* estas tre grava, almenaŭ tiom, kiom la temo mem. Pri tiu formo la recenzisto ne rajtas silenti aŭ nur paroli ektuŝe, akcesore. ... Deziri, ke tiun flankon de nov-aperinta verko oni konsideru aparte de ties enhavo kaj eĉ en speciala periodaĵo, aspektas al mi kiel kerna eraro..."

Mi estas danka al sro Avril pro liaj atentigoj. Ŝajne mi ne esprimis min kontentige precize, kaj tial mi aldonu kelkajn vortojn.

La ĉefa kaŭzo de miskompreno troviĝas verŝajne jam en la unua frazo de la artikolo: "...zorge atentu pri la lingvo...". Mi ne precizigis la vorton lingvo. Literature pensanta homo unualoke enmetas en tiun vorton la senco de lingva elformado de belliteratura ideo. Mi tamen uzis la vorton ne en tiu senco sed en la senco de uzado de vortoj kaj frazpartoj, sendepende de literaturaj aferoj, kiel ankaŭ almenaŭ sugestas la vortoj en la sekvanta frazo de la artikolo.

Lingvo en literatura senco estas la materialo per kiu la aŭtoro formas sian verkon, same kiel bildartisto formas sian verkon el marmoro aŭ farboj. Tial la formo estas tiom esenca en literaturarta verko, ke ofte oni povas nur teorie apartigi "formon" de "enhavo". Komprenoble recenzisto necese devas atenti pri la lingvo en tiu senco, same kiel kritikisto de pentraĵoj atentis pri linioj kaj koloroj. Sen ili la artverko ne ekzistus.

Tamen pentrajkritikisto en sia recenzo ne instruas pri linioj, koloroj kaj farboj, sed tion faras la artinstruisto. La taskon de tiu lasta plenumas en lingvaj aferoj la lingvoinstruisto. En esperantaj recenzoj la recenzisto tre ofte devas esti ankaŭ lingvoinstruisto. Tio ne estas por li malhonora, sed la aranĝo pro pluraj kaŭzoj ne estas konvena.

Miaj aludoj en la antaŭa artikolo kaj same tie ĉi estas nur ĝeneralaj. Komprenoble recenzisto havas rajton kaj iufoje eĉ devon mencii pri lingvaj eraroj aŭ nebonaj esprimoj.

La plej grava el la du aferoj tuŝitaj en la artikolo estas cetero lingvoinstrua gazeto. Nur okaze mi kunligis la du temojn. Rilate al lingvoinstrua pritrakto de aperantaj libroj (kaj gazetoj) en tia lingvoinstrua gazeto mi ne proponas, ke oni nepre skribu pri ĉiu libro. Ne temas pri recenzado en ordinara senco. Temas nur pri laŭcelaj pritraktoj de lingvoelementaj aferoj en aperantaj libroj (kaj volonte ankaŭ malnovaj).

Jam antaŭ la apero de "Recenzista dilemo" venis informoj pri la eventuale aperonta "Esperantologio". Tiu revuo, sciencula kaj multekosta, ne forigus bezonon de malkara lingvoinstrua gazeto por la granda plimulto de la esperantistoj

Stellan Engholm

Literaturo

Bento de Jesus Caraça: Galileo Galilei.
Trad. M. de Freitas
Eld. Portugala Eldona Rondo.

La libro ne estas granda (60 p.), tamen traktas astronomi-historie la temon de Thales ĝis Einstein. Instruaj kaj interesaj estas la klarigoj pri la astronomiaj konceptoj de la helenaj filozofoj. La sugesto, ke tiuj spiritaĵoj "intime" estis raciuloj, ŝajnas al mi diskutegbla. Propre ni scias tre malmulte pri la antikvaj civilizoj, kaj neniu el ni konas intime la tiamajn pensulojn. Ĉiuokaze restas esenca diferenco inter la helenaj kaj kristanaj skoloj: libera filozofia diskutado ĉe la unua, ortodoksismo kaj maltoleremo ĉe la alia.

La resumon pri la antikva astronomio sekvas legindaj rimarkigoj pri "Mezepoko de la astronomio". — "La racio estis subigata al la kredo, regis la *credo ut intelligam* (mi kredas por kompreni) de Sankta Anselmo; super Eŭropo etendiĝis vastega, nigra nokto — la nokto de l' malklero." (p. 39). Mi timas, ke por lumigi tiun nokton la kandelo de Caraça ne sufiĉas. La ombregon disĵetis ne la kristanaj etiko kaj moral-

sentoj sed la eklezia (pastrara) politiko, kiu "oficialigis" la katolikan dogmon. Etikon kaj moralon, ĉu kristanan ĉu humanisman, oni ne povas oficialigi, dekreti, ordoni. Jesuo mallaŭdis la homojn, kiuj per siaj arbitraj ordonoj nuligis la ordonojn de Dio. Same severe oni povas kaj devus admoni ekz. tiujn, kiuj per partiaj devigoj kaj subpremoj malnobligas la socialistan moralon.

Pro tempomanko (la libro estis origine prelego) la aŭtoro ne pritraktas la politikajn motivojn, kiuj igis la eklezion kontraŭbatali la helenan kulturon kaj ĝian sciencan idealon. Tia pritrakto tamen estus necesa por "sciencia kaj morala klarigo". Same necesa estus preparolo aŭ almenaŭ aludo pri la gravega influo de la tempomedio, sed pri tio mi ne trovis eĉ unu vorton. La klarigo ĝis certa grado fariĝis akuzo. "Okazis krimo en la nomo de Kristo". Tio per si mem ne multe diras. Okazis krimoj ankaŭ en la nomo de libero, de humanismo, en la nomo de ĉio nobla kaj bona.

Pri la prezento de la granda florencano mi volus fari jenan rimarkigon: Ĉu Galilei kiel homo kaj scienculo fariĝas malpli valora, se ni akceptas lin tia, kia li efektive estis — spirita giganto, kiu tamen restis kredema kaj kiu neniam sonĝis fariĝi apostolo de ateisma movado? (Li cedis antaŭ la inkvizicio ne nur pro timo).

Tamen la libreto estas tre leginda. Ĝi havas multajn valorajn pensojn kaj instigas al pensado. La lingvo estas gramatike korekta, kvankam oni pri diversaj formoj povas havi alian opinion. En popularscienca libro ni ŝatus havi pli popularajn terminojn. Prezo kaj papero estas bonaj.

L. C. Deij

Aleksis Kivi: Sep Fratoj. — Traduko el la finna de Ilmari Ekström, Vilho Setälä k. a. — Vinjetoj de Ahto Numminen. — Kun biografio pri la aŭtoro kaj klarigoj. — 360 p. 125×176 mm. — Prezo en brit. ŝ. broŝ. 12/10, bind. 16/8, egalvalore en aliaj valutoj. — Eldono Vilho Setälä, Helsinki, Finnlando.

Aleksis Kivi (1834—1872) estis pioniro de la finna teatro. Tamen lia ĉefverko Sep Fratoj estas tiaspeca romano, al kiu

ne konvenus teatra prezento kun dekoraj el pentritaj toloj. Sceneja iluzio pri la ĉirkaŭmondo de la fratoj, la finnlanda arbarregiono, tute malaperus antaŭ la drasta, mi ŝatus diri plastika imagobildo, kiun mi ricevis el tiu unika libro. Kaj tia imago (kiu alia libro donus ĝin?) tia plena enviviĝo en la naturproksima, naturidenta medio de la sep arbaraj simpluloj estas necesa por funde kompreni kelkajn csendajn aspektojn de la libro: la fundamentajn rilatojn inter la homoj kaj la nutranta tero, la spiritan radikigon en la propra medio, la naturan amon al la loko (ne la politika ŝtato), kie ripozas "la ostoj de la patroj".

Sep Fratoj do estas romano. La teatraĵa formo de la interparoloj estas bona solvo de rakontoteknika problemo. (Kiel oni pli trafe redonus tiom viglan konversacion de sep personoj?) Kaj tamen mi ŝatus nomi la majstroverkon de Kivi perfekta dramo, komprenante per tio laŭ klasika, angla formulo: *life presented in action*.

La priskribaj partoj estas mallongaj. Kivi enblovas vivon al siaj figuroj kaj jen la fratoj agas. Ili multe parolas kaj mem vortigas siajn pensojn. Kivi neniam sufloras al ili proprajn revojn kaj sopirojn. Kvazaŭ lude li plenumas la plej severan postulon kaj de la moderna dramo kaj de la moderna romano. Liaj figuroj havas propran vivon. Mi havis la impreson, ke mi kvazaŭ persone konatiĝas kun la fratoj, el kiuj plej kara fariĝis al mi ĝuste la malmolkapa, kruda Juhani; sendube la plej vivanta figuro. Jam post kelkdeko da paĝoj mi rekonis la "voĉon" de ĉiu el ili, sen rigardi la antaŭpresitajn nomojn. La moderna romanverkisto eliminis la leganton. Kivi eliminis la aŭtoron almenaŭ en la plej gravaj partoj de sia libro. Tio ne signifas, ke la verko fariĝis ia konglomerato de okazaj epizodoj sen "rakonta linio". Ĉiuj epizodoj estas interdependaj kaj rilatas senmanke kaj al la formala historio de la fratoj kaj al ilia interna vivo.

Eĉ la naturaj fenomenoj ludas difinitan rolon. Mi povas doni nur kelkajn ekzemplojn. Iam la fratoj por sin savi de morto pafas kvardek bovojn. Tio estas kvazaŭ murda laboro. "La pafiloj fulmis, bruegis, sed pli forte tamen tondris kaj fulmis

tie en la alto, kie fulmontondro veturadis sur la nubaj montoj." Kiam la fratoj post dek jaroj revenas al la malnova hejmo, tiam la ĉielo estas serena, la riveretoj gaje "lirlas", la birdoj kantas. Ĉu verkista fantazio? Mi supozas, ke la pli multaj legantoj eĉ ne rimarkos tiajn aferojn, kiel oni povas ne aŭdi bonan filmmuzikon aŭ ne rimarki la sonorajn rimojn en perfekta poemo. Sed imagu la filmon sen la apoga muziko, la poemon sen la rimoj. Ili paliĝus, eble perdis la tutan valoron. Same la naturo ĉe Kivi. Li rakontas tiel ne intence, ne por fari efektan, sed spontanec, per genia inspiro li rilatigas la naturon al la vivo de la homoj kaj inverse. Vivo kaj naturo estas unu.

Similajn rimarkojn oni povas fari rilate la enkomponitajn popolajn legendojn. Ĉio havas konkretan signifon kaj idean valoron. Estas mirige, ke ĝuste en tia libro, en kiu ne mankas krudaj paroloj, blasfemoj kaj malbenoj, neniuj vorto estas superflua. Ĝi estas majstroverko de realismo kaj romantiko, de vero kaj fantazio.

En kelkaj partoj Kivi iom tro rapidigis la fantazion. Kiam la fratoj revenas al la malnova hejmo, ili decidas inviti al festeno ĉiun renkonte venantan. Kaj jen unu post la alia ili renkontas siajn malamikojn. Tamen la sentebla plezuro, la vivovarma humoro, per kiu Kivi rakontas tiun epizodon, facile igas nin pardoni la ekflugon de lia fantazio. Tiu humoro estas esenca trajto de la libro.

Ne kontentigis min, ke la sonĝo de Simeoni tiom grave influis la postan vivon de la fratoj, kaj en la fino de la libro kelkaj partoj ŝajnas iom proksimiĝi al la stilo de dimanĉlerneja rakonto. Sed tiujn kelkajn rimarkojn oni rigardu nur atesto de persona gusto. Sep Fratoj estas ĉefverko de la mondliteraturo.

La traduko ĝenerale estas tre bona. Kivi uzis la parolatan idiomon de sia hejmmregiono, kaj por redoni tian familieran lingvon Esp. estas (ankoraŭ) tro literatura. Tial, sen kulpo de la tradukinto, pluraj esprimoj fariĝis nek kontentige imago-kreaĵ, nek kontentige "popolaromaj". (Mi pensas pri ordinarij esprimoj, ne pri idiomaĵoj.) Tamen oni povus pli bone konsi-

deri la nunan vulgaran Esperanton. Senpera verbigo de adjektivo havas en nia lingvo tro literaturan koloron. Ankaŭ la vortelekto estas foje tro libra. La prediko de Lauri estas sen-senca babilado de ebrulo, sed ĝi donas alian impreson. Precipe la rimoj estas tro "lertaj", kvazaŭ la analfabeto estus studinta la Parnasan Gvidlibron. Male la stilo estas foje tro "malliteratura". (Malmultan povas ĉiu havi esperon pri...). Mi trovis kelkajn gramatikajn erarojn kaj diskutindajn formojn, sed ili ne gravas rilate al la tuto.

Bedaŭrinde mi povis doni nur kelkajn ĝeneralajn impresojn. La libro donus temon por ampleksa studo literatura kaj lingva. La vinjetoj estas pli klarigaj ol ornamaj. Ili estas faritaj kun tre bona desegnotekniko. Tamen la iom lerneja stilo ne plene harmonias kun la potenca originaleco de la lingvo, kiu estas tre bone sentebla tra la Esperanta traduko. La preso estas bona. La majuskloj de la nomoj iom ĝenas.

L. C. Deij

Atentigo: pri Sep Fratoj troviĝas eseo en MR 2/47.

Se la suno senmove
en la alto restadus,
ni neniam eksciis,
ke la spaco estas plena
de sunoj lumantaj.
